

Esperanto
lingvo internacia

Invito al kunlaboro kun

Internacia
Komerca kaj
Ekonomia
Fakgrupo

IKEF
★
1984

Centra sidejo ĉe:

Mondkomerca Eldonejo Esperantista,
P.O. Kesto 25041,
3001 HA Rotterdam,
Nederlando.

La Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo estas internacia unuiĝo por komercaj kaj ekonomiaj interŝanĝoj mondskalaj.

La Fakgrupo fondiĝis en la lastaj monatoj de 1984, sekve de originala iniciato de S-ro Franz J. Braun, en Bühl, Okc. Germanio, kun organiza helpo de Mondkomerca Eldonejo Esperantista, en Rotterdam, Nederlando.

Kiam S-ro Braun estis ankoraŭ relative nova adepto al Esperanto, li jam, pro profesiaj direktadaj spertoj en grandrenoma kaj en kuraj landoj funkcianta industria entrepreno, konvinkigis pri la evidenta valoro de la lingvo en la kampo de internaciaj komercaj rilatoj. Ne trovinte spuron pri jam ekzistanta tiukampa kunordiganta unuiĝo, nek pri komercaj rilatoj nek pri interŝanĝado de spertoj en ekonomia scienco, S-ro Braun iniciatis sondadon de opinioj inter la Fakdelegitaro de UEA, pri la ŝajna subtenado trovebla por tia unuiĝo estonta.

La opinisonda cirkulero iris al pli ol cent kvindek adresoj en sesdek sep landoj, kaj ĝi petis respondon de ĉiuj, kiuj havis intereson kunlabori. La reagoj estis dekomence tre kuraĝigaj, tiel kuraĝigaj, efektive, ke jam en la daŭro de unu monato necesis elpensi metodon grandamase agnoski la reagojn kaj respondi plurajn demandojn. La unua 'Laŭokaze Novaĵletero' eldoniĝis meze de aŭgusto, 1984, kaj ĝi signalis la naskiĝon de la Fakgrupo.

La kerna ideo, kiu kaptis la intereson de la reagantoj, estas ambicia sed tamen plenumbla agadplano de sep apartaj celoj.

Fone al la apartaj celoj estas klara sento de la bezono kunordigi laborfortojn, pere de organizita Fakgrupo, por atingi pli generalan akcepton de Esperanto en la kampo de komercaj rilatoj, aparte inter jamaj uzantoj de la i.l., sed ankaŭ kiel varbinstigilo por Esperanto inter la multaj ekonomistoj kaj komercistoj kiuj ĝis nun ne uzas la lingvon, aŭ eĉ pretas kredi, ke ĝi ne estas tiel uzebla.

Proponitaj al tiuj iruaj reagantoj estas sep ideoj:

- labori por re-eldono de la konata Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro, en plivastigita formo rilate al la nombro de lingvoj, kaj pliampleksigita per novaj terminoj;

- instigi eksportantajn entreprenojn al uzado de la internacia lingvo por instrukcioj kaj priskriboj sur pakajoj de varoj;

- verki konstantan ekonomika-komercan rubrikon en iu revuo, aŭ eldoni bultenon pri la ekonomia situacio en apartaj landoj, komunumoj aŭ landaj grupoj, aŭ en la tuta mondo;

- instigi butikistojn kaj aliajn posedantojn de vendejoj, kaj ties komizojn, al lernado de Esperanto, (precipe en Kongresurboj), kaj instigi Esperantistojn preferi tiajn entreprenojn kiel eble plej ofte;

- malfermi rilatojn kun Komercaj Ĉambroj, kaj por doni informojn pri la i.l., kaj por instigi subtenadon de niaj laboroj;

- traduki en Esperanton jarfinajn raportojn de internaciaj entreprenoj, kaj por montri la taŭgecon de la i.l. en tiu kampo, kaj cele al plivastigo de nia faka vortprovizo;

- instigi al lokaj E.-grupoj teni kontojn kaj fari jarfinraportojn en Esperanto, kaj starigi taŭgajn kursojn pri komerco kaj ekonomio inter grupanoj.

Dum postaj monatoj, kelkaj aliaj ideoj aldoniĝis al la listo, sed la bazaj ideoj restas validaj kaj nun konstatiĝas kiel la unuaj celoj en sendube longa listo de agadoj iam entreprenotaj. Ĉiuj reagantoj generale interkonsentis pri la necesaj komencaj paŝoj, starigi ridindan organizaĵon, akumuli modestan kapitalon kaj enoficigi monskalan reton de agantoj kaj Perantoj.

Tiu unua Laŭokaza Novaĵletero estigis la unua en regula serio ses-foje en la jaro laŭ la nuna arango, kaj jam ĝi ebligis la aperigon de originalaj artikoloj de membroj, ĉefe en la formo de raportoĵoj pri apartaj spertoĵoj.

Regula rubriko estas Interŝanĝo de Ideoj, kunmetita el ideoj ricevitaĵoj en leteroj al la centra sidejo. La ideoj mem tuŝas multajn kampojn, de eldonado de fakaj studlibroj en pluraj fakoj, ĝis eblecoj de turismumaj vojaĝoj ĝis nekonata sed sendube bela parto de Afriko.

Restas demandoj pri ĉu la Fakgrupo vere povas ion atingi en la kampoj de komerco kaj ekonomio.

Jam ni pruvis, ke ni povas helpi en la simpla kampo de kontaktoj inter Membroj kiuj volas interŝanĝi varojn, sed tia agado restos modesta ĝis nia membraro multe pligrandiĝos. Ankoraŭ ni devas fari kontaktojn kun ĉiuj ceteraj Esperantistoj, kiuj havas rilatojn kun vendado de varoj kaj servoj, ĉar al tiuj ni povos proponi pli vastan aĉetantaron sub taŭgaj kondiĉoj. Tra tiaj kontaktoj, ni esperas atingi kontaktojn kun ne-Esperantistoj, kiuj tiam spertoĵoj pruvojn, ke la i.l. efektive taŭgas kiel universala helplingvo, je relative malalta kosto, por ĉiaj specoj de komerco kaj por ekonomiaj studoj.

Se vi, la leganto, havas rilatojn kun komerco, nepre subtenu nin per viaj kotizoj, per viaj leteroj kaj artikoloj por la Novaĵletero, kaj per viaj kontaktoj kun aliaj similaj personoj. Se vi estas posedanto aŭ reprezentanta direktoro de entrepreno, pensu pri la eblecoj, kiujn ni povus proponi al vi per reklamoncoj inter Esperantistoj en pluraj landoj, je vere malalta kosto; aliĝigu vian entreprenon al ni!

Egale grava voko iras al tiuj Esperantistoj, kiuj estas ekonomiistoj en la plej vasta senco.

La celoj de la Fakgrupo en la kampoj de ekonomio kaj ekonomia scienco estas ankoraŭ fiksitaj, krom en tio, ke estas jam evidenta la bezono por kunordiga laboro en

la terminologia kampo, kune kun tuta manko de studlibroj pri eĉ la bazaj ekonomiaj teorioj.

Se vi, la leganto, estas aŭ amatora aŭ profesia ekonomiisto, aŭ se, ekzemple, vi estas instruisto kiu eĉ parttempe instruas ekonomikon en via gepatra lingvo, pensu pri tio ĉi, ke viaj konsiloj havas gravon ankaŭ en la Esperanto-Movado. Se vi emas verki artikolojn pri apartaj ecoj de la ekonomia vivo en via lando, aŭ se vi ambicias al verkado de studlibro, aŭ nur al kunlaboro en la verkado de tia libro, konsilinda unua paŝo estas subteni la Fakgrupon, kiu celas kunordigi ĉiujn tiajn laborojn. Se, tamen, viaj spertoĵoj en la kampoj de ekonomio aŭ ekonomia scienco estas ankoraŭ komenciĝantaj, aliĝu al la Fakgrupo malfermus por vi pordojn al vera internacia studado de via elektita temo.

Neforgesinda, dum traktado de la spertoĵoj akireblaj per membreco de la Fakgrupo, estas la grava kampo de organizado je mondvasta skalo. Kiam bone funkcianta, la Fakgrupo dependos je internacia reto de agentoj, (kiujn ni nomas, Konsilantoj), kies bazaj taskoj estas, kaj reprezenti la enlandajn Membrojn al la Estraro de la Fakgrupo, kaj reprezenti tiun Estraron al la ceteraj Membroj.

Sendube, la taskaro de Konsilanto enhavas la banalan taskon kolekti kaj transpagi la kotizojn, sed en aliaj rilatoj la eblaj taskoj estas limigitaj nur per la imagpovo de la Konsilanto mem.

Facile priskribebla faceto de la laboro estas la kolektado de statistikaj donitaĵoj, por ebligi la regulan eldonadon de ekonomiaj bultenoj, kaj la interpretado kaj prikomentado de tiaj donitaĵoj por mondvasta publiko.

Tia laboro certe postulas la starigon de fidinda organizaĵo, por kiu, tamen, ni ankoraŭ ne konas la verajn bezonojn. La nura afero pri kiu ni povas senti certecon estas tio ĉi, ke tia organizaĵo funkcios pli bone uzante la internacian lingvon ol iu ajn alia organizaĵo jam ekzistanta por simila laboro. Aliĝu al ni por

montri la veran valoron de Esperanto!

La Fakgrupo konsilas al ĉiuj Membroj aboni al revuo MONATO, kaj subteni tiun revuon en ĉiu ebla maniero. Revuo MONATO sendube estas la plej taŭga revuo por fakaj artikoloj en la ekonomia aŭ politiko-ekonomia kampoj, aparte pro la eblecoj utiligi desegnaĵojn, grafikajojn kaj aliajn ilustraĵojn; tiaj raportoj aŭ artikoloj verkitaj far membroj de la Fakgrupo estas aparte bonvenigitaj flanke de la Redaktoro.

La revuo estas ankaŭ la plej taŭga eldonaĵo por aperigo de komercaj reklamanoncoj, de entreprenoj, aŭ jam mondkonataj aŭ aspirantaj esti mondvaste konataj.

En la terminologia kampo, la Fakgrupo laŭeble subtenas la laborojn de la Terminologia Centro de Internacia Scienca Asocio Esperantista, kaj de la Akademio de Esperanto.

Aliĝi al la Fakgrupo estas sufiĉe simpla afero; legu la ĉi-kunajn klarigojn, kaj plenigu kaj ensendu la aliĝilon!

Ni bonvenigos vian aliĝilon kaj enskribos vin en nian Membroliston kun aparta goĵo!

Rotterdam, La Estraro de IKEP.
marto, 1985.

- - - - - o - - - - -

M e m o r i g i l o .

poŝtadreso de la Fakgrupo :

Fakgrupo Komerca,
Postbus 25041,
3001 HA Rotterdam,
Nederlando.

La strataдресo, je kiu vizitantoj estas principe ĉiam bonvenaj post pertelefona averto :

van Heusdestraat 88 B,
3023 RX Rotterdam 6.

telefono: (...) 31 10 25 46 25;
(enlande: 010 - 25 46 25).

Telefonu prefere post la naŭa horo (en Nederlando!) vespere.

Organizaj klarigoj pri IKEP.

En la Statuto de la Fakgrupo, prioritato estas donita al la senpera rolo de la internacia lingvo, kaj al la malvualita intenco sekvi la severe neŭtralan politikon adoptitan de Universala Esperanto-Asocio.

La ĉefa celo de la Fakgrupo estas priskribita kiel kunordigi agadojn por disvastigi la uzadon de la i.l. por komercaj rilatoj kaj ekonomiaj interŝanĝoj.

La regado de la Fakgrupo estas konfidata al Konsilantaro, kiu efektas el sia propra konsisto Estraron, al kiu estas konfidata la tago-post-taga estrado de aferoj, sed kun la devo prezenti jarfinan raporton al la Konsilantaro.

Membreco estas malferma kaj al individuaj personoj kaj al instancoj; Membroj akceptas la devojn esti regataj per la Statuto, kaj partopreni, per regula pago de kotizo, en la financaj aferoj de la Fakgrupo.

Principe, ĉiu Membro havas rajton je unu voĉo en la voĉdonoj por elekto de Konsilantoj, kaj rajtas portempe transdoni tiun rajton al alia Membro en kazoj de ne-eblo ĉeesti kunvenon je kiu elekto okazos.

Konsilantoj estas aŭtomate reprezentantoj de la Fakgrupo por la regiono aŭ lando-parto en kiu la Konsilanto havas hejmon aŭ laborlokon.

Ordinare, Membreco komenciĝas aŭtomate kiam aliĝilo kun taŭga kotizopago estas ricevita ĉe la centra sidejo de la Fakgrupo.

Konsiloj pri pago de kotizo troviĝas sur la folio, de kiu la aliĝilo estas parto; en kazoj de malfacilaĵo pri pago, kandidato por membreco tamen plenigu la aliĝilon kaj ĝin sendu, kun skriba klarigo pri la malfacilaĵo, al la centra sidejo de la Fakgrupo.

1985-03-31.

Lawrence Mee,
Generala Sekretario.

La jarkotizo por membreco en la Fakgrupo estas dudek nederlandaj guldenoj. Membroj estas kuraĝigitaj fari pagon por pluraj jaroj en anticipo, kiel metodon ŝpari kostojn kaj laboron. Membro, aŭ kandidato por membreco, kiu anticipe pagas dudek-oble la jarkotizo aŭtomate fariĝas Dumviva Membro.

Membroj estas kuraĝigitaj fari kroman pagon laŭeble. La kroma pago povas esti donaco por la kurenta jaro, kontribuo al la asocia kapitalo, aŭ kontribuo al la Subtena Fondaĵo. Tiu lasta ebligas la membrigon de kandidatoj en landoj el kiuj ne-eblas fari transpagojn.

Ĉiuj financaj traktadoj de la Fakgrupo iras tra la kontaro de Mondkomerca Eldonejo Esperantista, kies poŝtĉekkonto 361 47 95 en Nederlando povas esti ordinare uzata, kun indiko, 'por la Komerca Fakgrupo'.

Rekomendata estas la uzado de internacia poŝtmandato de la poŝtinstancoj, adresita simile al Mondk. Eld. Esp., sed ankaŭ sendo

de konverteblaj monbiletoj ĝis ronda sumo. M.E.E. tenas konton en la kontaro de UEA, kiun simile povas esti ordinare uzata, kun indiko, 'Komerca Fakgrupo'.

Ĉekoj de komercaj bankoj estas ne-rekomendataj, pro la altaj transpagaj kostoj, sed se neniu alia ebleco estas malferma, tiam oni skribu ĉekon por la persona konto de S-ro L. Mee; nepre tiam aldonu ekvivalentan sumon de sep kaj duono guldenoj pro la kostoj.

Principe, la Fakgrupo preferas ricevi pagojn por pluraj membroj kune, per pago de Peranto. Se Peranto estas jam nomita por via lando, tiam prefere rilatu kun tiu Peranto en la unua instanco.

La Ĝenerala Sekretario pretas diskuti la eblecon enoficigi novajn Perantojn, kun kandidatoj kiuj jam havas spertojn fari pagojn al eksterlando. Peranto aŭtomate havas personan konton en la kontaro, kiu ebligas la akcepton de aliĝpetoj sen samtempa transpago de la kotizo(j).

lm

fortranĉu! →

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

ALIĜILO

Per tio ĉi mi/ni petas aliĝon al la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, kiel individua persono / entrepreno aŭ instanco, kaj deklaras la intencon subteni la Statuton de la Fakgrupo kaj finance kontribui al la mastrumado de la Fakgrupo.

loko : _____

dato : _____ (subskribo)

nomo, sub kiu la membreco ekestiĝu : _____

plena poŝtadreso : _____ (lando)

jaro de naskiĝo aŭ fondiĝo : _____ S-rino / F-lino / S-ro/ _____

priskribo de profesia okupo aŭ agadkampo(j) : _____

Laŭokaza novaĵletero

al subtenantoj de kaj simpatiantoj por
la proponita komerca fakgrupo.

Tiu ĉi novaĵletero estas kunmetita en Rotterdam de Lawrence Mee,
okaze de ricevo de reagoj al nia cirkulero de la 6-a de julio.

Estimataj,

Jam en la daŭro de unu monato ni ricevis sufiĉe da reagoj al
nia cirkulero por kuraĝigi nin kredi, ke ni jes havas la bazon de
vivanta fakgrupo pri komerco kaj ekonomio. Ni do kunmetas modestan
novaĵleteron, kaj ĝin sendas al ĉiuj interesitoj, dankante vin ĉiujn
pro viaj kuraĝigaj vortoj. Viaj komentoj kaj ideoj por estontaj
agadoj estos bonvenigitaj de, amike kaj kunlaboreme via,

Lorenc' Mi.

Administrado kaj financoj.

Necesis, jam de la komencigo,
adopti provizoran bazan admin-
istradon por la fakgrupo; iom
post iom ni povos ĝin plibonigi.

La iniciato por proponi la
fakgrupon venis de S-ro Franz
Josef Braun, (pr. braŭn), germ-
ano, 47-jaraĝa aĉetsekciestro en
la mondkonata industria entrep-
reno, 'Bosch', en suda Okcidenta
Germanio. Provizore, S-ro Braun
rolas kiel Prezidanto de la Fak-
grupo.

La ceteran laboron, provizore,
faras mi: S-ro Lawrence Mee,
(lorenc' mi), anglo, naskita en
1922 en Britio, sed loĝanta jam
en Nederlando dum dek unu jaroj,
diplomito pri direktadiko, Frat-
ulo de la Brita Esperanto-Asocio,
Delegito de UEA en Rotterdam,
kaj tiel plu. Se etikedo estas
bezonata, mi estas, provizore,
la Sekretario kaj Kasisto, ter-
eno en kiu mi havas plurajn spe-
rtojn.

La provizora adreso, (Postbus
25041, 3001 HA Rotterdam), est-
as la laŭleĝe registrita adreso
de Mondkomerca Eldonejo Esper-
antista; ĝi povos daŭre esti
uzata, ĝis alia persono surprin-
os la sekretarian taskaron.

La ĝisnunaj kostoj estas port-
ataj de Mondk. Eld. Esp., sed

debetitaj al persona konto por la
fakgrupo. Malantaŭ tiu persona
konto, mi starigas sendependan
librotenadon por la fakgrupo.

Mi proponas, ke la ĝisnunaj
elspezoj estu kapitaligitaj sub
rubriko, 'starigaj kostoj', kaj
de tie deskribotaj dum tri jaroj.
Kostoj ekde nun aperu sub mastr-
umado de la fakgrupo dum la kur-
anta kalendara jaro.

Necesas akiri enspezojn!
Mi proponas provizoran jarkotiz-
on por ordinaraĵ membroj, (kvan-
kam difino por 'ordinara membro'
ankoraŭ mankas!), en la sumo de
20,00 nederlandaj guldenoj, sumo
kiu verŝajne ebligus la eldonon
de modesta novaĵletero kvin aŭ
ses foje en la jaro, (eĉ se nenio
pli ol tio). Ĉar la duono de la
kuranta jaro jam forpasis, taŭga
sumo por 1984 estus dek guldenoj.
Necesas, tamen, iel akumuli kap-
italon. Mi faras du proponojn:

pagu nun la plenan kotizon
por la kuranta jaro, eblig-
ante la konservon de duono
de ĝi por la kapitalo;

faru kiel eble plej malav-
aran donacon rekte cele al
starigo de kapitalo.

Tria taŭga propono estas, ke
vi aldonu jam nun al iu pago
sumon de dudek guldenoj por esti

Bo. 21

paĝo du

via kotizo por la proksima jaro. Cetere, nenio malhelpas vin pagi jam nun la kotizon dum, ekzemple, kvin jaroj, por en praktika maniero esprimi vian fidon en la estonteco de la grupo.

Kiel fari pagon?

Prefere aŭ tra la poŝtĉekinstanco aŭ per internacia poŝtmandato. En ambaŭ kazoj, uzu simple la adreson:

Mondk. Eldonejo Esperantista,
P.O. Kesto 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederl.,

kaj per noto sur via pagilo indiku: por la fakgrupo komerca. Por pagoj tra la poŝtĉekinstanco, uzu kontonumeron 361 47 95 kiu estas la pĉk. de M.E.E. en Nederlando. Nur en kazoj, kiam ne eblas uzi la poŝtĉekinstancon,

vi rajtas sendi ordinaran bankĉekon aŭ fari bankan transpagon, sed tiam al mi persone, ĉar M.E.E. ne tenas bankrilaton. Sed nepre tiam memori la tre altajn kostojn, (6,75 gld.), postulatajn por transpagoj de malgrandaj sumoj tra la bankoj.

Se, pro iu kaŭzo, ne eblas al vi fari transpagon, nepre tamen sciigu nin pri via deziro, kvankam necesas emfazi, ke en la nuna stadio ni ne povas proponi alian rimedon.

Ĉar ni tuŝas financajn aferojn, necesas jam nun pensi pri jarfina financa raporto, kaj pro la rekomendindeco, ke tia financa raporto estu subtenata de almenaŭ unu Revizoro. Ĉu inter vi estas kvalifikita persono, kiu pretas formale revizii la kontotenanadon?

INTERKONATIĜO.

1. La kunfondintoj:

S-ro F.J. Braun, Hornisgrindestrasse 8, D-7580 Bühl,
Okcidenta Germanio;

S-ro L. Mee, van Heusdestraat 88A, 3023 RX Rotterdam, Nederl.,
(telefono: (post 21.00h je nederlanda tempo) 010 - 25 46 25);

S-ro B. Vogelmann, (adreso je paĝo 203; Jarlibro de UEA);

D-ro T.A. Goldman, (adreso je paĝo 387; Jarlibro de UEA);

S-ro D. Novaković, P.O. Box 334, Delson, QUE, JOI 1G0, Kanado;

D-ro G. Polerani, (adreso je paĝo 259; Jarlibro de UEA).

2. Individuaj reagantoj al nia cirkulero, (stato je 1984-08-10);
(ĉiuj troveblaj en la Jarlibro de UEA):

Belgio: S-ro R. Rotsaert, bankoficisto; paĝo 102;

Bolivio: S-ro J.R. Arze, advokato; paĝo 109;

Britio: S-ro N.T.R. Salvesen, komercisto kaj eldonisto; paĝo 132;

Greklando: S-ro G. Theologu, emerita komercisto; paĝo 223;

Hongkongo: S-ro Lee Teck Shiu, direktoro de eksportkompanio; paĝo 235;

Irano: F-lino S. Ahmad-Nia, studento; paĝo 245;

Japanio: S-ro S. Yamakawa, interpretisto kaj administristo; paĝo 274;

S-ro N. Sakurai, komercisto; paĝo 275;

Kamerunio: S-ro J.-M. Mboge Mbele, komerca reprezentanto; paĝo 283;

Nederlando:	S-ro W. Meijns, emerita administristo;	paĝo 315;
Sri-Lanko:	S-ro R.C. Peries, stenografiisto;	paĝo 344;
Svedio:	S-rino U. Luin, ekonomiisto;	paĝo 360.

3. Subtenaj instancoj en la Esperantista gazetaro:

Aŭstrio: Esperanta Redakcio de Radio Vieno;

Okc. Germanio: La Redaktoro de revuo MONATO.

Interŝanĝo de ideoj.

Facile eblas plenigi ĉiun disponeblan spacon en tiu ĉi modesta novaĵletero per citaĵoj el la leteroj jam ricevita, sed tiuj ne estis verkitaj por publikigado. La enhavo de estontaj novaĵleteroj, tamen, grande dependos je vi, la membroj, kaj ni invitas vin nun pripensi la eblecon verki iun mallongan eseon pri temo grava por vi. Ni petas vin afable konstati, ke ni ne promesas publikigi ĉiun verkaĵon tuj je ricevo, kaj ni rezervas la rajton mallongigi kontribuojn se necese. Ni proponas ordinaran longecon de 500 ĝis 600 vortoj, sed pretas konsideri eseon pli longan ol tio, se la aŭtoro mem proponas taŭgan metodon dividi ĝin en partojn, ĉiu de taŭga longeco. Provizore, ni pretas konsideri kontribuojn nur de membroj, de kiuj ni enregistris kotizon por la kuranta jaro. Tiu ĉi invito temas pri tiel nomataj fakaj artikoloj, kaj tute aparte ni invitas vin fari proponojn por la katuto kaj Regularo.

Ĉi-okaze, tamen, ni volas citi proponojn kaj ideojn el leteroj jam envenintaj.

Unu membro proponas, ke nia Fakgrupo ja mem komercu, precipe pri tiel-nomataj Esperantaĵoj, kiel ekzemple ŝlosilringoj kun insigno sur tenilo aŭ pendigilo, kaj simile.

Pluraj membroj mencias la eblecon publikigi en novaĵletero aŭ simile menciojn de varoj aktuale haveblaj por vendo, precipe por eksportado, kaj de unu membro venis promeso, dediĉi al la Fak-

grupo parton de iu komisipago ricevita pro traktaĵo efektivigita pere de kontakto tra la fakgrupo.

De membro en malriĉa lando venis invito al niaj membroj pensi pri la ebleco fari investon en tiu lando, pri kia investo nia membro estas kvalifikita esti konsilanto aŭ/kaj peranto.

Pluraj membroj atentigas pri la pripensindeco kompili, kaj en iu maniero eldoni, tutmondan adresaron de entreprenoj, (de iu ajn speco), kiuj pretas uzi la interracian lingvon. Nia tuja reago estas: Volonte! Ni atendas viajn sciigojn! (Verŝajne ni povus fari sufiĉe imponan unuan liston, se ni citus el la Katalogo de UEA la multajn eldonejojn konatajn.)

Pluraj membroj bonvenigas la eblecon interŝanĝi ideojn, opiniojn kaj spertojn. De unu venis vere kuraĝiga raporto pri spertoj dum internacia industria ekspozicio; tiu raporto mem meritas pli vastan legantaron! De alia venis la propono, ke ĉiuj membroj transdonu jam nun al la loka komerca ĉambro sciigon pri la ekzistode nia fakgrupo, kvankam nia reago al tio devas esti, ke la momento ankoraŭ ne estas matura.

Ne la malplej interesa aludo estas, ke nia reaganto "jam havas kelkajn rilatojn ... kun germanoj, sed ili uzas Ido-n por komercaj celoj." Nu, tio devas esti interesa temo por nia novaĵletero; se Ido taŭgas, des pli taŭga estus la internacia lingvo, ĉu ne?

Statuto; Regularo; organizaj demandoj.

Manko de formala Statuto ne malebligas nin tamen krei senton de solidareco inter membroj, kiuj emas kunlabori por pliproksimigi la atingon de diversaj celoj, jam pli malpli interkonsentitaj.

Certe venus tago, tamen, kiam ankoraŭa manko de formala interkonsento estus grava bremsa faktoro, kaj pro tio la temo merit- as jam konsideron.

Kiel ekzemplo ni citu nian elekton de nomo por la organizo. Nia adopto de la plej eble modesta nomo, dum kunmetado de la cirkulero kaj por la anoncetoj jam aperintaj, neniel celis trudi tiun nomon por ĉiam. Nun estas via vico, proponi pli taŭgan nomon.

Ŝajne neniu kontraŭstarus la formaligon jam nun de nia intenco, ke la lingvo de la organizo

aĵo estu Esperanto nepre sekvante la Fundamenton, (kun Oficialaj Aldonaĵoj). Sed ĉu troviĝas egale klara interkonsento pri la jam proponitaj agadpunktoj? Ĉu grava agadpunkto mankas? Ĉu iu aparta celo devus esti pli klare priskribita? Ĉu por vi iu aparta agadpunkto en nia listo estas la plej grava? Kaj tiel plu.

Kutime, oni faras aludon, en formala Statuto, al la devoj kaj rajtoj de membroj, kaj eĉ al eblecoj limigi membrecon al tiuj, kiuj havas specifan kvalifikon. Ĉu vi havas apartan volon, tiurilate? Ĉu vi opinias, ke arangi kunvenojn de membroj estas aparte grava tasko? Ĉu vi mem pretas jam surprizi apartan taskaron aŭ funkcion?

Viaj proponoj estos ĉiuj menciitaj en postaj raporto.

Diversaĵoj.

Kluwer
Ne surprize, nia aludo al la Int. Komerca-Ekonomika Vortaro vekis apartan intereson; ni eĉ ricevis unu klaran peton ebligi la aĉeton de (brokanta) ekzemplero. Se iu membro disponas pri ne-bezonata ekzemplero de ĝi, bonvolu peti kontakton kun la aĉetonto.

Ne estis afero de hazardo, ke la propono labori por re-eldono de la IKEV staras je la supro de la listo de agadpunktoj; neniu inter ni povas dubi, ke tiu estas tre urĝa tasko, sed samtempe tasko verŝajne plenumbla en la relative baldaŭa estonteco, supozante la eblecon akumuli la necesan kapitalon.

La laboro aldoni novajn lingvojn jam kontentige marŝas, sub gvidado de S-ro Vogelmann. Venas jam la tempo kolekti proponojn por kompletigi la enhavon per bezonataj sed ĝis nun mankantaj terminoj. Ĉiuj inter vi estas petataj dediĉi tempon, diligente studadi la vortaron, kaj sciigi nin pri viaj proponoj. Ni provos iel publikigi la proponojn, cele al atingo de interkonsento

pri difinoj kaj tradukoj.

Tute aparte, estas grave, ke ni sciu, kiuj inter vi efektive posedas la vortaron kaj pretas akcepti iun respondecon, proponi terminojn en via gepatra lingvo.

--00--

La agadpunkto, instigi lokajn grupojn teni kontojn en Esperanto, (kaj tiel plu), vekis intereson; kiom inter vi jam havas spertojn tiurilatajn?

Simile: la agadpunkto publikigi ekonomiajn bultenojn pri apartaj landoj, (kaj tiel plu), kaptis atenton, kaj oni atentigis nin pri la jama Ekonomia Bulteno pri Usono. Ni emas sciigi, kiom inter vi jam abonas al tiu bulteno, kaj simile pri kiom inter vi abonas al revuo MONATO, konata pro multaj iniciatoj en la ekonomia kampo.

Mi proponas devizon por nia grupo: Al la mondo pli valoras niaj atingoj ol niaj aspiroj.